

Gazeto



Andaluzia

Andaluzio per si, por Hispanio kaj la Homaro

35-a Jarkolekto - Septembro 2021 - N-ro 122

Porcuna **(Jaeno)**



Julio / Septembro 2021

Enhavo

- P. 03 Esperanto en Andaluzio.
P. 06 Picasso, unuaj jaroj en Malago
P. 10 La enseñanza de la lengua y cultura chinas en Andalucía.
Cómo se introduce un idioma en las escuelas.
P. 15 Lingva Angulo.
P. 19 Poezia Angulo.
P. 20 Nuntempa Vortaro
P. 22 Folioj por Praktikado
P. 27 La Pomo de Adam.
P. 33 Turismi en ...
Porcuna (Jaeno)
P. 37 Notoj pri Esperanto kaj Andaluzio:
Carmen Juan Lovera.
Kultur-esploristo en Jaeno.
P. 40 $E=mc^2$ Scienca Angulo:
Skleroto kaj Sklerozo.
Etimologio, helpu nin!
P. 42 Flamenko
Manuel Vega García
"El Carbonerillo".
P. 44 Fervojistista angulo
Al-Ándalus Expreso.
P. 46 Nun Ni. Infanoj.
P. 49 Andaluzia kuirarto
Gazpaço el Melono.
P. 50 Misteroj kaj Legendoj de Andaluzio: *La Tarŝiŝaj Reĝoj*
Gargoro kaj Habo.
P. 52 Vorto-ludoj
Krucvorto kaj Rebuso.
P. 54 Humuro.

Gazeto Andaluzia

*Fundada por D. José Garzón Ruiz, en San Fernando (Cádiz) en 1910.
Órgano oficial de la Asociación Andaluza de Esperanto.*

EDITA: Asociación Andaluza de Esperanto

REDACCIÓN: C/ Ánfora 6 5-D
29013 Málaga (Hispanio)

DEPÓSITO LEGAL: MA-1136/86.
ISSN: 1576-0618.

DIRECTOR: Ángel Arquillos López

REDACTORES:

José María Rodríguez Hernández
Alejandro Burgos Escalante

COLABORADORES:

Vicente Herrera Cobo

Juan García del Río

Lukas Toczki

Sur la kovrilo:

Panorama vidaĵo de Porcuna (Jaeno)



ESPERANTO EN ANDALUZIO

OKAZIS RETE ORDINARA ĜENERALA ASEMBLEO DE ANDALUZIA ESPERANTO-UNUIĜO.-

La pasintan 21-an de septembro okazis ordinara ĝenerala asembleo de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo. Ĉi-jare, ni ne sukcesis organizi ĉeestantan renkontiĝon pro la kronviruso, do, oni kunvokis membrojn kaj estraranojn al reta kunsido. Oni debatis kaj aprobis jenon:

- Oni sciigis pri la demarŝoj cele la eldonon de verko enhavanta legendojn kies aŭtoro estis la romantika verkisto Gustavo Adolfo Bécquer (Sevilo 1836 / Madrido 1870). Finfine aperos la tradukoj en esperanto de 5 legendoj. La tasko traduki ilin jam estas preskaŭ finita, nun estas necese trapasi polurigan kontrolon por plibonigi la tradukaĵojn. Espereble, la libro aperos dum la venonta jaro 2022.

- Oni parolis pri la eblo organizi kongreson aŭ renkontiĝon en Andaluzio por la venonta jaro 2022, eĉ oni prezentis projekton por okazigi semajnfinan kunvenon en malaga vilaĝo. Tamen, fine oni ne alprenis konkretan decidon, pro la fakto, ke la kronvirusa krizo ankoraŭ ne estas tute solvita.



- Sekvis debato pri la nuntempa situacio de la informiloj de la asocio. La eldono de *AEU-Bulteno* kaj de *Gazeto Andaluzia* estas sufiĉe kontentiga, pro la fakto, ke ambaŭ publikigaĵoj aperas ofte kaj regule. Por ŝpari elspezojn oni decidis eldoni la internan informilon *AEU-Bulteno* nur rete.

- Alia punkto de la tagordo estis la prezento de la nuntempa konto-stato de la asocio fare de la kasistino. Ŝi asertis, ke ĝi estas sufiĉe kontentiga, tamen samtempe oni avertis pri la neceso plialtigi la kvanton de membroj de la asocio.

- Fine, oni decidis organizi eksterordinaran asembleon okazonta dum la unuaj monatoj de la venonta jaro 2022. Dum tiu kunveno oni devos elekti aŭ reelekti estraron de la asocio. Tutcerte, tiu venonta asembleo denove okazos kiel reta kunveno.

ZAMENHOFA-FESTO EN SEVILO

Kiel ĉiuj jaroj, la pasintan 15-an de decembro Sevila Esperanto-Asocio organizis bankedon honore al Zamenhofa Tago. Tradicie kaj tra la tuta mondo, en tiu tago oni organizas specialajn aktojn por memori la aŭtoron de la internacia lingvo Esperanto, kiu naskiĝis la 15-an de decembro 1859.



KURSOJ DE ESPERANTO EN SEVILO 2021 / 22

Organizata de Sevila Esperanto-Asocio okazas de la monato oktobro 2021 ĝis junio 2022 kurso de la internacia lingvo ĉe la Casa de las Sirenas, Alameda de Hércules. La kurso okazas ĉiu-merkrede de la 19-a ĝis la 20:30-a horo.

Same, en la Universitato de Sevilo okazas kurso de Esperanto ĉe la Fakultato pri Financoj kaj Turismo (Avenuo S. Francisco Javier), marde de la 16-a ĝis la 18-a horo.

NOVA NUMERO DE LA REVUO *VENTO*

Eldonita de esperantista veksilologia grupo, kunlabore kun Andaluzia Esperanto-Unuiĝo, ĵus aperis la numero 10-a de la revuo *VENTO*, la nura publikigaĝo en la internacia lingvo, kiu pritraktas temojn rilatajn al veksilologio (flagscienco). Ene de ĉi tiu numero aperas artikoloj pri la usona flago, la itala trikoloro, la belga flago, flagoj dum olimpiaj ludoj, ktp. La revuo aperas nur rete, kvankam oni anoncas la baldaŭan aperon de libro enhavanta ĉiujn artikolojn aperintajn ene de tiuj dek revuoj.

La revuo estas senpaga kaj libere legebla ĉe: www.esperanto.ac/vento



ESPERANTO, PRISTUDINDA TEMO EN STUD-LIBRO

La sevila eldonejo "Algaida" proponas en sia stud-libro pri Filozofio por studentoj de la unua mez-gradita kurso en Andaluzio, redakti mallongan studon pri Esperanto. Tiel, ene de sekcio pri taskoj por la lernanto, la teksto proponas:

"Serĉu informojn pri esperanto kaj diru ĉu temas pri natura, artefarita aŭ formala lingvo. Ellaboru en via kajero mallongan redakton enhavanta la plej gravajn eltrovojn de via esplorado".



PICASSO, *unuajjaroj en Malago*

Sciata, ke Pablo Ruiz Picasso, konsiderata unu el la plej grandaj artistoj de la 20-a jarcento, disvolvigis sian artan karieron unue en Barcelono kaj poste en Parizo. Tamen, la unuajn pentraĵojn li kreis en la andaluzia urbo Malago, ĉar tie li naskiĝis en la jaro 1881 kaj tie loĝis ĝis 1891.

Lia naskiĝo verdire estis mirakla. Tuj post la akuŝo, la ĵus-naskita bebo restis sen-mova kaj sen-spira. La akuŝistino provis fari kion ajn por savi la vivon de la infano, tamen sen-sukcese. Tiam, Salvador Ruiz, onklo de la ĵus-naskito kaj kuracisto, memoris antikvan medicinan sperton, laŭ kiu, foje, por atingi ion estas necese provoki kontraŭan efekton, Tiel, li enspiris fumon de sia cigaro kaj li enblovis tiun fumon en la nazon de la ĵus-naskito. Tio kaŭzis al bebo konvulsian spasmon, sed li ekploregis kaj movis sen-ĉese siajn brakojn. Tio okazis la 28-an de oktobro 1891 en domo de la Placo Merced en la urbo Malago.

La patro de Pablo Ruiz Picasso estis pentristo. Li laboris kiel profesoro en la Belarta Akademio de Malago, do, infan-aĝe, la pentriloj de la patro fariĝis ludiloj por Pablo, kies unuaj eldritaj vortoj estis "*piz, piz*", el la hispana "*lápiz*" -krajono-. Jam sep-jaraĝa, la patro trejnigis la infanon en figura desegno kaj olepentrado. Laŭ la patro, ĉiuj pentristoj bezonas unue disciplinan kopiadon de grandaj majstroj.

Ok-jaraĝa Pablo ĉeestis kun sia patro taŭro-ludon, post tiu sperto li pentris sian unuan olepentaĵon: "*El Picador Amarillo*" (La Flava Pikadoro), malgranda pentraĵo (24 x 19 cm) realigita sur ligna cigar-skatolo. Pablo



Pablo Ruiz Picasso. Malago 1889



"El Picador Amarillo", 1890
(*La Flava Pikadoro*)

Picasso dum sia vivo neniam donacis aŭ vendis tiun unuan pentraĵon. Post la morto de la artisto la pentraĵon aĉetis privata franca kolektanto.

En la jaro 1891 oni kunvokis labor-lokon kiel profesoron en la Belarta Lernejo de Korunjo, en Galegio. Tiu laboro signifis pli altan salajron ol tiu ricevita en Malago, krome, en la jaro 1888 la patro de Pablo Picasso ĉesis kiel arta respondeculo de la Muzeo de Malago, do, mono ne abundis hejme. Pro tio, la familio translokiĝis en Korunjon.

En la urbon Malagon li nur revenis por somerumi en la jaroj 1896 kaj 1897, en tiuj jaroj la familio jam loĝis en Barcelono, tie la patro atingis laboro-lokon

kiel katedratiisto pri desegno. La lastan fojon kiam Pablo Ruiz Picasso venis en Malagon okazis dum la vintro de la jaro 1901.

Sciate ankaŭ, ke Pablo Ruiz Picasso kunlaboris kun la respublika registaro. Li estas la aŭtoro de impona kaj belega pentraĵo "*Guernica*", kiu kritikis la bombardadon de tiu baska vilaĝo fare de germanaj aviadiloj dum la enlanda milito. Do, li neniam revenis en Hispanion post la venko de la generalo Franko en tiu milito. Tamen, en la jaro 1953 la ĉefdelegito en Malago de la Belarta Departamento petis al Picasso donaci kelkajn pentraĵojn kaj ceramikaĵojn por krei muzeon. La artisto, entuziasmita, respondis: "*mi ne sendos du pentraĵojn, sed du kamionojn plenaj el ili*". Tiu donaco ebligis la fondiĝon de muzeo dediĉita al Picasso en lia naskiĝ-urbo. Tamen, la naciaj aŭtoritatuloj, politike kontraŭaj al li, rifuzis tiujn donacojn. Do, la muzeo ne fondiĝis en tiu jaro.

Picasso forpasis en la jaro 1973 en Francio. En 1992, Christine Ruiz-Picasso, bofilino de la pentristo, kontaktis kun kulturaj respondeculoj de Malago okaze de ekspozicio dediĉita al li en la urbo. Same en la jaro 1996 okaze de alia

alia ekspozicio. En tiu jaro oni denove proponis la ideon krei muzeon kaj tiucele la familio Ruiz-Picasso donacis 50 artaĵojn, tiel, en la jaro 2003 oni inaŭguris la Muzeon Picasso de Malago (MPM).

Nuntempe, ĉi tiu muzeo, la plej vizitata en Andaluzio, montras pli ol 200 artaĵojn de la plej universala malaga artisto. Ĝi ricevas pli ol 700.000 vizitojn jare.

Esperanto, ponto inter popoloj



Nova ponto super la rivero *Guadalhorce* en Malago

ALIĜU AL Andaluzia Esperanto-Unuiĝo

Se Vi deziras kunlabori en la disvastigado de la internacia lingvo en Andaluzio, jen Via asocio.

Por aliĝi al AEU kontaktu kun: cordoba@esperanto.ac
Jara Kotizo: 20 € pagebla ĉe la jena konto:

- Caixabank ES74 2100 7234 6713 0048 0698

Okaze de la pago de la jara kotizo bv. informi pri la jenaj sciigoj:

- Nomo de la aliĝanto.
- Afero: Kotizo 2022.



HAZTE SOCIO DE LA Asociación Andaluza de Esperanto

Si deseas colaborar en la difusión de la lengua internacional en Andalucía, aquí tienes tu asociación.

.Para hacerse socio contacta con: cordoba@esperanto.ac
Cuota anual: 20 € que se pueden abonar en la cuenta siguiente:

- Caixabank ES74 2100 7234 6713 0048 0698

Cuando pagues por favor informa de los siguientes datos:

- Nombre del socio.
- Concepto: Cuota 2022

La enseñanza de la lengua y cultura chinas en Andalucía. Cómo se introduce un idioma en las escuelas.

En el año 2011 la Consejería de Educación de la Junta de Andalucía y la Oficina Nacional de Promoción Internacional de la Lengua China-Instituto Confucio, firmaron un acuerdo marco de colaboración, el cual tenía como objetivo introducir y promocionar el chino como lengua extranjera en los centros docentes públicos de Educación Primaria y Educación Secundaria Obligatoria en Andalucía. Este acuerdo fue renovado en el año 2014, llegándose a crear 8 Aulas Confucio, que servirían como referentes a los centros donde se enseñaba este idioma, además de ser este último el centro donde se podría obtener titulación con validez oficial reconocida internacionalmente, el diploma YCT para jóvenes y el HSK para adultos.

En aplicación de estos acuerdos, el Instituto Confucio se responsabiliza del proceso de selección del profesorado chino, a quienes paga el viaje y sus remuneraciones, por lo que no supone una carga económica para la Administración andaluza. Igualmente dota este Instituto del material didáctico necesario para las aulas de chino, así como las actividades que se organicen en el centro para promocionar la enseñanza del idioma. Por supuesto, todos los cursos son gratuitos para los alumnos.



Cartel anunciador del curso de chino. I.E.S. "Juan Ramón Jiménez" de Málaga

Según el acuerdo suscrito por las autoridades educativas andaluzas y chinas la enseñanza de este idioma se desarrollará en dos ámbitos:

- En horario de mañana como materia curricular en los colegios para los alumnos del centro.
- En horario de tarde como materia extraescolar en esos mismos centros educativos y abiertos a toda la población.

En el presente curso 2021/2022 son ya 42 los colegios e institutos donde se enseñan la lengua y la cultura chinas, repartidos por las 8 provincias andaluzas. Ocho de esos centros son considerados como Aulas Confucio. Estos 42 colegios están servidos por 37 profesores, todos ellos de nacionalidad china, excepto una profesora española incorporada en el presente curso 2021/22. En cuanto al número de alumnos, son aproximadamente 2.500 los alumnos de colegios e institutos que aprenden chino como materia curricular, mientras que 500 siguen los cursos como materia extraescolar, esto es un total aproximado de 3.000 los alumnos que están aprendiendo esta lengua en Andalucía, sin contar claro está, los que siguen los estudios de chino en las Escuelas Oficiales de Idiomas de Andalucía.



Las autoridades educativas andaluzas visitaron el aula de chino del Colegio Público "Miguel de Cervantes" en Armilla (Granada) 2016.

En cuanto al alumnado que ha solicitado seguir los cursos de lengua y cultura china, según las estadísticas la mayoría de ellos son hijos de familias chinas que emigraron de su país a España y cuyos padres no quieren que olviden su idioma nacional, por lo que en muchas ocasiones también es el idioma utilizado en casa. También hay solicitudes de niños que fueron adoptados en

China por familias españoles y que quieren aprender la lengua, historia y tradiciones del lugar donde nacieron. Por supuesto también hay un gran número de alumnos interesados por el conocimiento del idioma y por las perspectivas económicas que supone el comercio internacional con China.

En cuanto a la enseñanza en sí del idioma y la cultura chinas en los colegios, la Consejería de Educación considera más idóneo ofertarlo únicamente en el tercer ciclo de Primaria, es decir a los cursos de 5º y 6º (10 - 12 años). En 5º curso los alumnos reciben una iniciación al idioma y a la cultura, mientras que en 6º se mantiene la toma de contacto y el idioma empieza a enseñarse con más fluidez. En cuanto a la E.S.O. (Enseñanza Secundaria Obligatoria), se imparte como materia optativa en los cursos 1º, 3º y 4º, centrándose en el conocimiento de la cultura y el arte chino, así como en el uso de la lengua con actividades que estimulan las destrezas de comprensión y expresión oral.

Estos datos permiten afirmar que la lengua china en la actualidad es la tercer idioma extranjero, tras el inglés y el francés, más estudiado en los centros de enseñanza pública en Andalucía.

¿Qué enseñanzas pueden obtenerse de esta implantación del idioma chino en el sistema educativo andaluz?

En primer lugar que para conseguirlo ha sido necesario contar con la iniciativa de un país poderoso. El esfuerzo en la dotación de profesorado para Andalucía, que no olvidemos es aportado y sufragado en todos sus gastos por la administración educativa china, ha sido inmenso. De tal modo que si se realiza una ratio entre alumnos de centros públicos en Andalucía y número de profesores de diferentes idiomas, se observa que la ratio profesor/alumnos es mucho más favorable en los cursos de lengua china. Así:

Nº Alumnos Primaria que estudián inglés (3 ciclos):	426.733
Nº de maestros especialidad inglés	4.653
Nº de alumnos por cada maestro de inglés	92
Nº Alumnos Primaria que estudian francés (2 ciclos):	284.488
Nº de maestros especialidad francés	1.698
Nº de alumnos por cada maestro de francés	168

Nº Alumnos Primaria que estudian chino (42 centros):	2.495
Nº de maestros especialidad chino	37
Nº de alumnos por cada maestro de chino	67

En este caso menos es más, en tanto que cuanto menos alumnos tenga un profesor mejor enseñanza se puede facilitar.



Clase de lengua china en un centro educativo de Andalucía

En segundo lugar, no parece que sea determinante la facilidad o dificultad en el aprendizaje del idioma. Hay que destacar el hecho de que según estudios realizados, para conseguir un nivel elemental (A2) en lengua china es necesario dedicar 4 horas a la semana de estudio durante algo más de un año. Para conseguir ese mismo nivel bastarían 3 meses para el idioma inglés y poco más de 2 para el francés. En la elección por parte del alumnado andaluz de un idioma tan alejado fonética y gramaticalmente del castellano, como es el chino, también influye el hecho de que la gran mayoría de estos alumnos ya utiliza la lengua china en casa.

Por último habría que analizar cuál es la motivación principal del alumnado andaluz para decantarse por el estudio de la lengua china. Como se ha indicado anteriormente, gran parte de los alumnos son familiares de emigrantes chinos en Andalucía, por lo que el motivo principal sería estudiar en el colegio la gramática, así como la cultura, de una lengua que ya hablan, o al menos escuchan, en casa. Por otra parte, también hay alumnos que lo aprenden porque se trata de un idioma muy importante en el comercio internacional, sin embargo

esta motivación parece más bien ser una justificación para los padres de los alumnos, en tanto que la preocupación por los idiomas que se hablen en el comercio internacional no parece que sea uno de los mayores intereses para un niño de 10 a 12 años. Por eso, quizá la razón principal por la que un niño andaluz, que no provenga de familia china, se interese por esta lengua sea la de aprender las nociones básicas para poder expresarse en una lengua exótica para él.

¿Qué enseñanzas puede sacar el movimiento esperantista de esta introducción, que sin duda irá a más, de la lengua china en los colegios andaluces?

Por desgracia, o más bien afortunadamente, detrás del esperanto no hay ningún gobierno, ni ninguna potencia económica o militar que lo promueva. Tampoco tenemos la capacidad financiera suficiente para poder contratar a unas decenas de profesores que lo enseñaran en los colegios, aunque sí podemos contar con profesores y maestros, que ya lo son de otras disciplinas, que con sus conocimientos de esperanto pudieran proponer a sus centros la organización de un curso de la lengua internacional, como ya se ha venido haciendo en centros como en el IES "Almenara" de Vélez Málaga, o hace ya muchos años en el IES "Séneca" de Córdoba o en el "Padre Coloma" de Jerez.

Por eso, lo único que podemos esperar es que la difusión del esperanto, principalmente por internet, siga adelante y que un alumno vea tan natural aprender la lengua internacional como el chino, aunque en aquel caso lo tenga que hacer de manera autodidacta a través de un curso en la red.





Hemos visto ya en múltiples ocasiones el uso del acusativo en esperanto. Nosotros, que hablamos castellano, identificamos el complemento directo en las oraciones por el orden de colocación de las palabras. Así, decimos "*yo leo un libro*", en esa estructura vemos que el objeto directo lo colocamos detrás del verbo. En esperanto podemos colocar las palabras en el orden que queramos, eso sí, el complemento directo lo indicaremos con la terminación *-n*, así, *mi legas libron*, o *libron legas mi* o *legas mi libron*.

Hoy vamos a ver un uso de este mismo acusativo "*-n*" que nada tiene que ver con los complementos directos, es el acusativo de dirección. Este acusativo indica el lugar de destino de la acción verbal, es decir sería la respuesta que damos a la pregunta "*¿Adónde vas?*". En este caso, el acusativo no solo se puede utilizar detrás de un verbo o de un adjetivo, como veíamos en el caso del complemento directo, sino que también podría ir detrás de adverbios.

Veamos algunos ejemplos:

- *Mi iras en la urbon*. Yo voy a la ciudad.

Es cierto que también podríamos decir *Mi iras al la urbo*, lo que sería más usual si es que pensamos la frase como un hispano-parlante, pero el matiz de "*en la urbon*" da a entender que voy al interior de la ciudad.

Así, "*al la urbo*" puede significar que voy a la ciudad, pero que iré de paso, porque mi destino es otro. Este matiz no existe en castellano, si en nuestro idioma nacional decimos "Yo voy a Sevilla", no sabemos si esta ciudad es nuestro destino final o es que tendré que pasar por allí porque voy a Cádiz, que

sí es al destino final al que me dirijo. En ese caso podríamos decir:

- *Mi iras al Sevilo kaj poste en Kadizon.*

Así, si utilizamos "En + destino en acusativo" estaremos indicando que nos dirigimos al interior de algún sitio, que es es nuestro destino final.

En + lugar en acusativo indica que ese es mi destino final.

Este "en + lugar en acusativo" no solo se usar para indicaciones geográficas. Veamos la siguiente frase:

- *Tiu ideo venis tuj en mian menson.*

Esa idea vino inmediatamente a mi mente.

De este modo, imaginemos que la idea "fue viajando" y tuvo como último destino mi mente. Así que, usaremos "en + acusativo de dirección" siempre que nos refiramos a un desplazamiento hacia el interior de algo, sea o no un lugar geográfico. Valdría también para el caso de introducir en un idioma, es decir, de traducir:

- *La aŭtoro tradukis la libron en esperanton.*

El autor tradujo el libro al esperanto.

El acusativo de dirección no solo se utiliza con la preposición "en", también lo encontramos con "sur" (sobre), indicando que algo se posa, o es lanzado "sobre" algo pero con un movimiento. Ej:

- *La kato saltis sur la tablon.*

El gato saltó sobre la mesa.

Es decir, el gato estaba fuera de la mesa y saltó sobre ella. Si dijéramos simplemente "*la kato saltis sur la tablo*", esta frase indicaría que el gato se encontraba ya en la mesa y dio un salto sobre ella, pero sin desplazarse realmente a ningún otro lugar.

En el ejemplo "*La birdo flugas en la câmbro / en la câmbron*" ocurre lo mismo. Si decimos "*en la câmbro*" nos referimos a que el pájaro vuela en el interior de una habitación; pero si usamos "*en la câmbron*" nos estamos refiriendo a que vuela "hacia la habitación", es decir que se encuentra fuera de ella y con su vuelo se dirige adentro.



Hemos indicado anteriormente que no solo se utiliza el acusativo de dirección con sustantivos, sino que también lo encontramos con adverbios. Pongamos como ejemplo el adverbio "*sube*", formado en base a la preposición "*Sub*" (debajo de) y también "*sure*" que proviene de "*Sur*" sobre.

- *Iru suben kaj prenu botelon el la kelo.*
Ve abajo y coge una botella de la bodega.

El acusativo de dirección añadido a "*sube*" da la idea de que hay que desplazarse a un lugar que se encuentra bajo el que habla.

- *Venu supren, via patro vokas vin.*
Ven arriba, tu padre te llama.

Una traducción correcta en castellano usaría también la preposición "hacia" (hacia abajo / hacia arriba).

Incluso con "*supren*" encontramos el verbo "*supreniri*", que podemos traducir como "subir", literalmente "ir hacia arriba".

También podríamos convertir en adverbio el sustantivo, ya sabes se suprime la "o" final y se añade "e". Así, podríamos decir en vez de "*Mi iras en la urbon*", "*Mi iras urben*" o incluso "*Mi iras Sevilen*", aunque no es un uso muy habitual, no sería para nada erróneo.

Igual ocurre con adverbios como "antaŭe". Ej.

- *Bravaj soldatoj marŝas antaŭen.*
Valientes soldados marchan hacia adelante.
- *Malantaŭen !, kriis la ĉasisto por fuĝigi la leonon.*
¡(Hacia) Atrás! Gritó el cazador para espantar al león.

Con estos adverbios podemos formar los verbos:

- *Antaŭeniri:* ir hacia adelante, avanzar.
- *Malantaŭeniri:* ir hacia detrás, retroceder.

Por último, ¿podría darse el caso de que en una frase aparecieran los dos tipos de acusativo? Es decir, usar en una oración el acusativo de complemento directo y el acusativo de dirección.

Por supuesto y no es nada extraño. Imaginemos que queremos meter nuestro vehículo en la cochera:

- *Je la oka horo, mi parkumas mian aŭtomobilon en mian remizon.*
A las ocho horas aparco mi automóvil en la cochera.
Mian aŭtomobilon: acusativo de complemento directo.
En mian remizon: acusativo de dirección.

Finalizamos esta sección con más ejemplos de acusativo de dirección:

- *Malvarmas, pro tio mi metas miajn manojn en la poŝojn.*
Hace frío, por eso me meto las manos en los bolsillos.
- *Turnu dekstren ĉe la venonta strato kaj Vi trovos la Grandan Placon.*
Gira a la derecha en la siguiente calle y encontrará la Gran Plaza.
- *La infanoj eniris en la ĉambrom kaj ili vidis la donacojn.*
Los niños entraron en la habitación y vieron los regalos.
- *Iru hejmen kaj Vi estos feliĉa.*
Ve a casa (al hogar) y serás feliz.
- *Venu ĉi tien, ni iros poste en la ekspozicion.*
Ven aquí, iremos después a la exposición.

OKTOBRO

Mi kuŝis sur la tero kastilia,
beno de senfina horizonto,
kaj ĝin aŭtuno volvis en la blondo
tenera de krepusko hel-radia.

Plugilo lanta-puŝa, sendevia,
la sulkojn faris per la soka fronto,
kaj simpla mano ŝutis kun volonto
la semojn al la kampo multe-stria.

Plenan de sento alta kaj profunda
la koron mian pensis mi elŝiri
kaj ĵeti al la sin' de sulko tera,

por vidi ĉu, el tia sem' engrunda,
jam en printempo povus sin eltiri
la arbo de l' eterna amo vera.




Juan Ramón Jiménez
"Sonetos Espirituales" (1915)

*En esperanton tradukis:
Fernando de Diego*



MALGRANDA VORTARO PRI VULKANOJ KAJ VULKANOLOGIO



Tipos de erupciones *Tipoj de erupcioj*

Castellano	<i>Esperanto</i>
Erupción hawaiana	<i>Havaja erupcio</i>
Erupción stromboliana	<i>Strombolia erupcio</i>
Erupción vulcaniana	<i>Vulkana erupcio</i>
Erupción pliniana	<i>Plinija erupcio</i>
Erupción peleana	<i>Peleja erupcio</i>



Volcanes según su actividad

Volcán activo
Volcán durmiente
Volcán estinguido

Vulkanoj laŭ aktiveco

Aktiva vulkano
Dormanta vulkano
Neaktiva aŭ estingiĝinta vulkano

Material expulsado

Gas
Magma
Lava
Lajar
Ceniza
Bombas
Piroclastos
Vapor de agua
Polvo volcánico

Erupciita materialo

Gas
Magma
Lafo
Laharo
Cindro
Bomboj
Piroklastoj
Akva vapor
Vulkana polvo

Más términos

Fumarola
Caldera
Maar
Volcán submarino
Toba volcánica
Fajana

Pliaj vortoj

Fumarolo
Kaldero
Malprofunda kratero
Submara vulkano
Tofo
Basa insulo



MARIE SKŁODOWSKA-CURIE

Aŭtune de 1891, en la pariza Sorbono **komencas studadon juna polino** -Marie Skłodowska-, ŝi alvenis **el la lando**, kiu de cent jaroj estis mallibera. Ŝi loĝis en **eta**, nehejtita ĉambro, sur la sesa etaĝo de domo en la Latina Kvartalo, tie ŝi baraktis **kontraŭ la ĉiama manko de mono** kaj la malfacilaĵoj de la vivo en fremda lando. Ŝi studis en la universitato **samtempe** fizikon kaj matematikon.

Jam en 1893 Maria Skłodowska **fariĝis** licenciato pri fiziko, ŝi atingis la unuan lokon; unu jaron pli poste, sur la dua loko, ŝi fariĝis licenciato pri matematiko. **Ŝi ekkonis** tiam la jam elstaran francan fizikiston Pierre Curie, kiu fariĝis ŝia edzo kaj la plej proksima scienca kunlaboranto. Komence, la juna sciencistino okupiĝis pri la esploroj pri magnetismo. Tamen, baldaŭ **ŝi turnis la atenton** sur **la radiado eliganta de** la plej peza el inter **la tiam konataj** elementoj: uranio.

> **Aŭtune**

Se traduce por "en otoño". El adverbio, terminación "e", nos da mucho juego en esperanto. Podríamos haber dicho "en la sezono aŭtuno" o "en aŭtuno" (literalmente "*en la estación de otoño*" o "*en otoño*"), pero si lo convertimos en adverbio ya estamos indicando esa idea: "*en otoño*".

> **komencas studadon juna polino.**

Se traduce por "*comienza el estudio una joven polaca*". Podríamos pensar que la estructura lógica habría sido "juna polino komencas studadon", es decir: sujeto + verbo + objeto, pero en esperanto podemos colocar el orden que

queramos, siempre que el objeto se indique con el acusativo "-n". ¿Qué es lo que comenzó "*la juna polino*"? Studadon.

> el la lando

Lo traducimos como: "*desde el país*". Recordemos que la preposición "*el*" significa: "*desde*", "*de*" con la idea de partir del interior de un lugar. Ella venía del país... "*kiu de cent jaroj estis mallibera*", es decir "*el cual desde cien años atrás- no era libre*", es decir de Polonia.

> eta

Se traduce por "*pequeño*". Hay que recordar que los sufijos y los prefijos se pueden convertir en adjetivos o incluso en sustantivos, para eso habrá que añadirles los finales correspondientes. En este caso al sufijo "-*et*", que usamos para el diminutivo, le añadimos el final "*a*" de los adjetivos, así obtenemos un adjetivo que podemos traducir por "*pequeño*".

Maria loĝis en eta kaj nehejtita ĉambro.

María habitaba en una habitación pequeña y sin calefacción.

Podríamos también haber escrito:

Maria loĝis en nehejtita ĉambreto.

> kontraŭ la ĉiama manko de mono

Se traduce como: "*contra la constante falta de dinero*". "*Ĉiam*" es un adverbio que significa "*siempre*" (literalmente en todo tiempo). Pero como hemos dicho antes, podemos convertir cualquier palabra en adjetivo si le añadimos el final "*a*". Así, "*ĉiama*" expresa la idea de "*siempre*", "*constante*", "*permanente*", o incluso una palabra que apenas usamos en castellano: "*sempiterno*".

> samtempe

Se trata de "*en la sama tempo*" convertido en adverbio: *samtempe*. Significa "*al mismo tiempo*". Otros ejemplos de la misma construcción serían:

- "*En la sama loko*": *samloke* (en el mismo lugar).
- "*En la sama maniero*": *sammaniere* (de la misma manera).

> fariĝis

Lo traducimos como "se hizo", "se convirtió". Recuerda que el final "-*iĝ*" en un verbo lo convierte en reflexivo. Así, "*fari*" = hacer; "*fariĝi*" = hacerse.

Más ejemplos de la terminación "iĝ" en los verbos podemos encontrar en:

- *Sidi*: sentar (a alguien) *Sidiĝi*: sentarse.
- *Detruj*: destruir (algo) *Detrujiĝi*: destruirse.
- *Fermi*: cerrar (algo) *Fermiĝi*: cerrarse.

> **Ŝi ekkonis**

Se traduce por: "*Ella tomó contacto*", "*Ella empezó a conocer*". "*Ek-*" es el prefijo que indica "*empezar a hacer algo*". *Ŝi ekkonis lin tiam* (Ella empezó a conocerle entonces". Veamos algunos ejemplos más con este prefijo:

- *Eklabori*: empezar a trabajar.
- *Ekstudi*: empezar a estudiar.
- *Hieraŭ nokte ekpluvis*: ayer por la noche empezó a llover.
- *Ne parolu plu kaj ekdormu jam!*: no hables más (tiempo) y empieza ya a dormir.

Y si lo utilizamos como interjección "*Ek!*" significa: "¡Venga! ¡Vamos!.

> **Ŝi turnis la atenton**

Lo traducimos como: "ella volvió la atención"

> **la radiado eliganta de**

Se traduce por: "*la radiación proveniente de*". Con el final "*-anta*" formamos el participio presente de los verbos. Veamos algunos ejemplos:

- *Knabo studanta matematikon*: chico que estudia matemáticas.
- *Viro laboranta en oficejo*: hombre que trabaja en una oficina.
- *Virino parolanta la francan lingvon*: mujer que habla el idioma francés.

En todos estas frases podríamos haber usado también la construcción:

..., kiu ...

- *Knabo, kiu studas matematikon*.

El participio sería de pasado con "*-inta*" y de futuro con "*-onta*":

- *Viro laborinta en oficejo*: hombre que trabajó en una oficina.
- *Virino parolonta la francan lingvon*: mujer que hablará la lengua francesa.

> la tiam konataj

Si hemos visto antes que "*ĉiam*" se traduce por "*siempre*", ahora es el turno de "*tiam*", que traduciremos como "*entonces*" (literalmente en ese tiempo). "*La tiam konataj*" podemos traducirlo como "*los entonces conocidos*".

Para seguir practicando:

1) El sufijo EK se utiliza para:

- a) expresar una idea contraria.
- b) Indicar que una termina una acción.
- c) Indicar que empieza algo.

2) Si quiero utilizar una preposición que expresa una idea de origen partiendo del interior de un lugar, emplearé:

- a) De
- b) El
- c) Da

3) ¿Cuál de estos participios indica la idea de que un joven fue estudiante en el pasado?

- a) Junulo studanta
- b) Junulo studinta
- c) Junulo studonta

4) ¿Y de que ese mismo joven será estudiante en el futuro?

- a) Junulo studanta
- b) Junulo studinta
- c) Junulo studonta



**Cada pueblo con su
lengua y el esperanto
para todos.**

Solvoj / Soluciones:

1: a 2: b 3: b 4: c

lernu!

Esperanto?

www.lernu.net

Página multilingüe para el aprendizaje
del idioma internacional Esperanto



Cursos

Lecciones interactivas de Esperanto con ejercicios, sonidos e ilustraciones

A^B

Gramática

Estudio de toda la gramática del Esperanto con ejemplos

Biblioteca

Materiales multimedia del mundo real del Esperanto



Foros

Puntos de encuentro en multitud de idiomas y sobre diferentes temas en y sobre el Esperanto



www.lernu.net



La Pomo de Adam



Lukas Toczki

En la komenco Dio kreis la ĉielon kaj la teron. Kaj la tero estis senforma kaj dezerta, kaj mallumo estis super la abismo; kaj la spirito de Dio ŝvebis super la akvo. Kaj Dio diris: Estu lumo; kaj fariĝis lumo. Kaj Dio vidis la lumon, ke ĝi estas bona; kaj Dio apartigis la lumon de la mallumo.

Genezo 1 1:5

Aperis ree la ĵus kreita suno en la Paradizo kaj Dio vidis, ke ne estis eble diferencigi la bestojn, unu de aliaj. Jes, ĉiuj kreitaj bestoj estis malsimilaj, kelkaj havis kvar krurilojn, aliaj rampis sur la tero, multaj flugis inter la nuboj, fine aliaj naĝis inter mar-ondoj. Tamen, Dio ne povis alparoli ilin, ili simple ne havis nomojn.

Per Sia sen-fina saĝeco, Dio estus kapabla asigni nomojn al ĉiuj ili post sekundo, temus pri facila tasko por Tiu, Kiu kreis la mondon nur en ses tagoj. Tamen ne estus Li, Kiu poste akompanus la bestojn sur tero, maro kaj ĉielo. Li ankaŭ ne eltirus profitojn el ili. Lia plej grava kreitaĵo, la homo, estus la mastro de ĉiuj bestoj, pro tio Adam, la ununura homo ĝis tiam ekzistanta, ĝuus la grandan honoron doni nomojn al ĉiu kreitaĵo, unue al bestoj, poste al plantoj.

Tiel, unu post alia, Dio prezentis ĉiujn bestojn antaŭ Adam. Unuamomente, la sola homo en la Paradizo asignis tre facilajn nomojn: *koko, kato, hundo, rano...* sed Dio seninterrompe venigis pliajn kaj pliajn bestojn antaŭ li. Do, iom post iom facilaj nomoj elĉerpiĝis kaj pro tio Adam sekvis kun pli malfacilaj nomoj kiel *lemuro, kanguruo, testudo, elefanto*. La bestoj ŝajnis esti sennombraj, tiel Adam finfine uzis strangajn nomojn malfacile memoreblaj

kiel *gimnofiono, sfenodonto, gasterosteo, orikteropo, galeopiteko*... Temis pri tre malfacila laboro, kiu okupis multajn horojn kaj Dio vidis, ke la homo laciĝis pro tiu tasko. Do, Li decidis ripozi.



- *Mi vidas, ke vi estas fatigata* - diris Dio. - *Morgaŭ ni daŭrigus ĉi tiun taskon. Tiam vi nomigos ĉiujn plantojn de la Paradizo. Ho, Adamo! Vi estas la mastro de ĉiuj kreitaĵoj kaj vi rajtas uzi ilin laŭvole. De ĉiu arbo de la Paradizo vi manĝu; sed de la arbo de sciado pri bono kaj malbono vi ne manĝu, ĉar en la tago, en kiu vi manĝos de ĝi, vi mortos.*

Adam respondis:

- *Ho, mia Dio, mi agos laŭ via volo, tamen, ĉar ankoraŭ plantoj en la Paradizo ne ricevis nomojn, kiel mi konos la arbon de sciado pri bono kaj malbono?*


Tuj Dio diris:

- *Por distingi tiun arbon mi gravuros sur la trunkon de tiu arbo du literojn: P M, kies signifo estas "Prohibite Manĝi". Tiam vi vidos, ke tiu estas la arbo de sciado pri bono kaj malbono.*

Tiam Adam, la ununura homo en la Paradizo, ekdormis. Okazis, ke Dio faligis profundan dormon sur li, kaj ĉi tiu endormiĝis; kaj Li prenis unu el liaj ripoj kaj fermis la lokon per karno. Kaj Dio la Eternulo konstruis el la ripo, kiun li prenis de la homo, virino, kaj Li venigis ŝin al la homo. Ŝi nomiĝis Eva.

En la sekvanta mateno, kiam la juna suno ree aperis en la horizonto, Adam montris al Eva ĉiujn bestojn al kiuj li antaŭe asignis nomon. Sed li ne povis montri plantojn, ĉar ili ankoraŭ ne havis nomojn. Kaj Adam avertis al Eva:

- *Vi rajtas mastri ĉiujn bestojn kaj manĝi ĉiujn plantojn, sed unu el ili ne. Dio, la Eternulo, diris al mi, ke la frukton de la arbo de sciado pri bono kaj malbono ni ne manĝu.*



Kiam Eva izoligis en la ĝardeno, ŝi ne kuraĝis tuŝi fruktojn de la arboj. Tiam, aperis besto rampanta.

- *Adam nomis min "serponton", ekdiris la besto. Kaj ĝi diris al virino:*

- *Ĉu Dio diris, ke vi ne manĝu de ĉiuj arboj de la ĝardeno?*

Eva tiam respondis:

- *La fruktojn de la arboj de la ĝardeno ni povas manĝi, sed la fruktojn de la arbo de sciado pri bono kaj malbono ni ne povas, ĉar tiam ni mortos. Tamen, mi ne scias kie troviĝas tiu arbo.*

- *Se vi malsatas, manĝu la fruktojn de tiu arbo, diris la serpento kaj ĝi montris al Eva la arbon signitan per la literoj PM. - Dio mem signis ĉi tiun arbon per tiuj literoj kun la signifo, ke ĝi estas "Preferata Manĝaĵo". Se vi manĝas ion de ĝi vi satigos vin.*

- *Ĉu vere?* demandis Eva. - *Ĉu ĉi tiu arbo ne estas la arbo de sciado pri bono kaj malbono?*

- *Jes, tutcerte, mi ne mensogas,* respondis la serpento. - *Vidu, la frukto de ĉi tiu arbo nomiĝas PoMo, tion mem gravuris Dio sur la trunkon. Do, temas pri Pom-arbo, ne pri la arbo de sciado pri bono kaj malbono.*



Kaj Eva vidis, ke la arbo estis bona por manĝi, kaj ŝi prenis PoMon kaj ŝi manĝis kaj ŝi donis kune ankaŭ al Adam, kaj ili kune manĝis. Kaj malfermiĝis la okuloj de ili ambaŭ, kaj ili sciigis, ke ili estis nudaj; kaj ili kunkudris foliojn de alia arbo kaj faris al si zonaĵojn.

Kaj ili aŭdis la voĉon de Dio, la Eternulo, kiu marŝis en la ĝardeno dum la malvarmeto de la tago; kaj Adam kaj Eva kaŝiĝis de Dio inter la arboj de la ĝardeno, ĉar ili estis nudaj. Kaj Dio ekkriis:

- *Ĉu vi manĝis de la arbo, pri kiu mi ordonis al vi, ke vi ne manĝu de ĝi?*

Kaj Eva respondis:

- *Verdire, tio ne estas tute klara afero, mia Dio. Vi diris al Adam, ke ni ne manĝu de la arbo de sciado pri bono kaj malbono. Mi tiun arbon ne tuŝis. Mi prenis frukton de arbo kies frukto nomiĝas: PoMo, ĉar Vi mem gravuris ties trunkon kun la literoj P M. Do, tutcerte la arbo de kiu mi manĝis frukton ne estas tiu de sciado pri bono kaj malbono. Mi manĝis frukton de Pom-arbo, jen la vera nomo de tiu arbo.*

Adam, kun sia buŝo ankoraŭ plena je bongustaj pomoj, kapjesis.

Dio la Eternulo, iom konfuzita, diris:

- *Ho, Eva! Tiu arbo, kiun mi gravuris kun la literoj P M -kies signifo reale estas "Prohibite Manĝi"- estas la arbo de sciado pri bono kaj malbono. Do, vi sendube ne obeis min.*

Eva respondis:

- *Ho, mia Dio! Jen pridiskutinda afero. PM povas havi pliajn signifojn. Se Vi uzas mallongigojn anstataŭ kompletajn vortojn, Vi riskas ne esti bone komprenita. Ekzemple, PM povus signifi ankaŭ: "Preferata Manĝaĵo", "Perfekte Manĝebla", ktp. Pro tio, mi ripetas, ke mi ne manĝis frukton de tiu arbo de sciado pri bono kaj malbono, sed PoMon, prenita el Pom-arbo.*

Adam, ĉirkaŭigita de grajnoj de ĵus manĝitaj pomoj, spektis tiujn vortarajn diskutojn inter Dio la Eternulo kaj Eva la Edenulo.



Kaj Dio tiam kriis, kaj la krioj estis perfekte aŭdataj en la tuta universo:

- *Estu malbenataj vi ambaŭ, malbenita estu la tero pro vi, kun suferoj vi manĝados de ĝi dum via tuta vivo. Kaj dornojn kaj pikaĵojn ĝi kreskigos por vi, kaj vi manĝados herbojn de la kampo. En la ŝvito de via vizaĝo vi manĝados panon, ĝis vi revenos en la teron el kiu vi estis prenita; ĉar vi estas polvo kaj refariĝos polvo.*

Eva respondis, kvankam duonvoĉe:

- *Vi povas krei laŭ Via volo, tamen el la vortara vidpunkto mi tute pravas.*

Kaj Dio la Eternulo eligis ilin en la Edena Ĝardeno, por ke ili prilaboradu la teron, el kiu ili estis prenitaĵ, kaj Li lokis antaŭ la Paradizo anĝelon portanta flaman glavon, por gardi la vojon al la arbo de vivo. Kaj kiam Adam kaj Eva, jam for la Paradizo, apenaŭ estis videblaj en la distanco, la anĝelo diris al Dio:

- *Ili estas nur du kaj jam okazis lingva problemo. Mi ne kapablas imagi kio okazos kiam ili estos milionoj.*

Kaj Dio respondis:

- *Mi esperas, ke iu iam solvos tiun problemon.*

La anĝelo tiam diris:

- *Tion Vi esperas. Do, Vi estas Esperanto.*





En la provinco Jaeno, tuj apud Kordova provinco, starigas unu el la plej antikvaj vilaĝoj en Andaluzio. Ties nomo devenas el la pra-romia *Ibolca*, kiu fariĝis *Obulco* kun la romianoj, *Obolcon* kun visigotoj kaj *Bulkuna* kun la araboj. De tie la nuntempa nomo *Porcuna* (prononcu: *Porkúna*).

Pro sia elstara geografia pozicio, la vilaĝo troviĝas sur altaĵo, ĝi estas kvazaŭ natura fortreso kaj ĝi ĉiam ludis gravan rolon kiel strategian pozicion facile defendebla.

Blazono de Porcuna



La originojn de la vilaĝo estas eble trovi en la Neolitika Epoko (3.000 jaroj a.K.). Dum la 7-a kaj 6-a jarcentoj a.K. ibera popolo, la turduloj, venis en ĉi tiun zonon. Oni trovis restaĵojn de ĉi tiu antikva kulturo en loko apuda nomita "*Cerrillo Blanca*". Tie oni elfosis tombejojn kaj malgrandajn statuojn de gravaj militistoj. Dum ĉi tiu epoko *Porcuna*, tiam *Ibolca*, produktis siajn proprajn monerojn, sur ili estas eble legi la turdulan alfabeton, kvankam ĝi ankoraŭ ne estas komprenata.

Post la turduloj, romianoj okupis la urbon. Oni diras, ke en *Porcuna* Julio Cezaro preparis sian strategion por la batalo de *Munda*, okazinta en la jaro 45 a.K. Tiam Cezaro venkis la armeon de Pompejo kaj li atingis la kompletan povon en Romo. Kelkaj romiaj konstruaĵoj, kiel akvo-rezervujo kaj amfiteatro, nuntempe restas en *Porcuna*. Dum la 8-a jarcento p.K. la vilaĝo estas konkerita de la araboj kaj ĝi fariĝis *Bulkuna*, unu el la plej gravaj kvartaloj ankoraŭ havas araban nomon: "*Alharilla*".

En la jaro 1241 la kastilia reĝo Ferdinando la 3-a konkeris la urbon, li tuj cedis ĝin al la Ordeno de Kalatravo, religia kaj milita ordeno kiu konstruis fortreson kaj defend-turojn.

Fine de la 16-a jarcento en *Porcuna* loĝis preskaŭ 5.000 homoj, la vilaĝo ricevis reĝajn privilegiojn. Tamen, kelkaj jaroj da malbonaj rikoltoj en la kamparo provokis grandan ekonomian krizon kaj tiel, fine de la 18-a jarcento la vilaĝo perdis grandan kvanton da enloĝantoj.

Okaze de la napoleona invado de Hispanio, la generalo Castaños preparis en *Porcuna* sian strategion por la batalo de *Bailén* kontraŭ la franca armeo. En la 19-a jarcento la urbo, jam kun 10.000 enloĝantojn, riĉiĝis dank'al olivarboj kaj cerealoj.

En la jaro 1919 okazis en *Porcuna* gravaj protestoj de terkulturistoj kontraŭ terposedantoj. Tiuj luktoj okazigis vunditojn, eĉ infano mortis, kaj pli ol cent terkulturistoj estis arestitaj.

Dum la hispana enlanda milito, tuj apud la vilaĝo stariĝis batalfronto inter la respublika armeo de la provinco Jaeno kaj la frankistaj trupoj venintaj de Kordovo.

Nuntempe, *Porcuna* estas vilaĝo kun pli ol 6.000 enloĝantoj, kies ĉefaj ekonomiaj rimedoj estas la terkulturado, ĉefe la olivarboj kaj la tritiko. La ŝton-tajlado ankaŭ estas grava industrio en la vilaĝo.

Monumentoj

• La Ŝtona Domo.

Temas pri domo konstruita inter la jaroj 1931 kaj 1960 de privata tajladisto. La tuta domo kaj ĉio interne de ĝi, eĉ mebloj, estas faritaj el ŝtono.



• Nova Turo aŭ Turo de Boabdil

Konstruita de la Kalatrava Ordeno sur unu el la flankoj de la araba kastelo inter la jaroj 1411 kaj 1435. La turo estas 28 metroj alte. La nomo "Turo de Boabdil" devenas de la fakto, ke la granada reĝo Boabdil estis enprizonigita ene de ĝi post la batalo de Luceno en la jaro 1483.





• Preĝejo Nia Sinjorino de *Asunción*.

Konstruita inter la jaroj 1872 kaj 1910 post disfalo de antikva gotika preĝejo. La arta stilo de la nova paroĥejo estas nov-romanika bizanca. Ene de ĝi troviĝas surmuraj pentraĵoj de la fama kordova pentristo Julio Romero de Torres.

Festoj

La 21-an de marto okazas festo kun religia parado honore al Sankta Benito, patrono de la vilaĝo.

La dua dimanĉo de la monato majo okazas pilgrimado al la surkampara preĝejo de la Virgulino de *Alharilla*. Jam dum la antaŭa sabato okazas festo ĉirkaŭ la preĝejo.

Gastronomio

Kiel dirite, *Porcuna* troviĝas en la provinco Jaeno, tuj apud la kordova provinco, do, ties gastronomio havas elementojn tipajn de ambaŭ provincoj, kie oliv-oleo estas nepra.

La gazpacho ellaborita en *Porcuna* nomiĝas "Gazpacho al Melón", tio estas: malvarma supo farita el melono.

Estas konataj la "violetes" (viand-risoloj). Kiel dolĉaĵoj, bongustaj estas la "Gallina en leche", ellaborita kun lakto, sukero, ovoj, cinamo, migdaloj kaj pano.



Venontnumere
Turismi en.... COMPETA
(Malago)



Andaluzia Esperanto-Unuiĝo:
en la reto: www.esperanto.ac
en Twitter: [@AndaluzioEO](https://twitter.com/AndaluzioEO)

Kunlaboru kun la disvastigo de la internacia lingvo en Andaluzio kaj de la andaluzia kulturo en la tuta mondo pere de esperanto.

Aliĝu al A.E.U. (Pliaj informoj sur la paĝo 9-a)

Asociación Andaluza de Esperanto
en internet: www.esperanto.ac
en Twitter: [@AndaluzioEO](https://twitter.com/AndaluzioEO)

Colabore con la difusión de la lengua internacional en Andalucía y de la cultura andaluza en todo el mundo por medio del esperanto.

Hágase socio de A.E.U. (Más información en la página 9)



Notoj pri Esperanto kaj Andaluzio.

CARMEN JUAN LOVERA, kultur-esploristo en Jaeno

Plejofte aperas sur ĉi tiuj paĝoj pri historio de esperanto kaj esperantismo en Andaluzio, homoj vivintaj antaŭ la hispana enlanda milito (1936 - 1939), aŭ post la reveno de demokratia sistemo en nia lando (1978). Ŝajnus, ke Andaluzio travivis dezerton rilate la lernandon kaj disvastigon de esperanto, inter la fino de tiu terura milito kaj la realveno de Demokratio. Sendube tio okazis.

Tamen, la panoramo rigardata rilate nian lingvon en Andaluzio dum tiuj jaroj ne estis absoluta dezerto. Kelkaj homoj lernis kaj disvastigis esperanton dum la 5-a kaj 6-a jardeko de la pasinta jarcento, kvankam tiu intereso pri la internacia lingvo ne ŝuldiĝis al internaciemaj aferoj, sed al kultur-amo de intelektuloj. Unu el tiuj andaluzoj kiuj lernis esperanton en tiuj jaroj estis Carmen Juan Lovera.

Carmen Juan Lovera naskiĝis en la granada vilaĝo Huescar en la jaro 1924, tamen, apenaŭ sepmonata, la familio translokiĝis en *Alcalá la Real*, vilaĝo en la provinco Jaeno. Tie ŝi ĉeestis lernejon kaj junaĝe ŝi sekvis



Carmen Juan Lovera
1924 - 2018

kaj finis studojn pri historio en la Universitato en Sevilo. Dum siaj universitataj studoj ŝi vojaĝis tra Eŭropo, ĉar Carmen Juan enamiĝis al ĉio rilata Arto kaj Historio.

Post la studoj en la universitato, ŝi revenis en sian vilaĝon, *Alcalá la Real*. Tie, ŝi eklaboris kiel profesoro en oficiala mezgrada lernejo kreita kaj aŭspicita de la urbodomo mem, temis pri elstara gimnazio el kiu poste eliris

universitataj profesoroj kaj agnoskitaj profesiuloj. En Alcalá la Real, Carmen Juan organizis prelegojn pri artaj temoj, ekspozicioj kaj ŝi ellaboris studojn pri la historio de la vilaĝo. Tiel, ŝi diskonigis sian tezon rilate la naskiĝon en *Alcalá la Real* de *Juan Ruiz*, fama hispana poeto de la 14-a jarcento, pli konata kiel "*Arcipestre de Hita*" (ĉefpastro de la vilaĝo *Hita*). Biografioj de tiu fama poeto asertis, ke li naskiĝis en *Alcalá de Henares* (Madrido), tamen Carmen Juan Lovera prezentis argumentojn en siaj libroj por demonstri, ke tiu elstara poeto reale naskiĝis en *Alcalá la Real*.

fondis la publikan bibliotekon de *Alcalá la Real*, kies unua direktoro ŝi estis. Poste tiu kulturejo ricevis ŝian nomon. Same, ŝi estas la aŭtoro de kvindeko da eseoj kaj libroj rilataj la historion de *Alcalá la Real*.

Kion pri esperanto? Ni ne scias kiam kaj kial Carmen Juan Lovera interesiĝis kaj lernis la internacian lingvon. Sendube, ŝi lernis esperanton pro sia intereso rilate kulturajn temojn. Kiam? Tio devis okazi komence de la 60'jaroj pasintjarcente, ĉar jam en 1962 ŝi aperas kiel membro de Hispana Esperanto-Federacio. Certe,



Publika biblioteko en Alcalá la Real (Jaeno), kies nomo estas "Biblioteko Carmen Juan Lovera", okaze de publika omaĝo al ŝi dediĉita en la jaro 2014

Kiel kultura esploristo, ŝi estis agnoskata historiisto, membro de la Reĝa Akademio pri Beletroj en Kordovo kaj de la Instituto de Jaenaj Studoj. Kiel honoron ŝi ricevis la krucon de la kultura ordeno de Alfonso la 10-a, la Saĝulo. En la jaro 1955, ŝi

ŝi nenion verkis publike en aŭ pri esperanto, sed ŝia aparteno al E-movado en Hispanio pravas la fakton, ke unu el la plej gravaj kulturaj esploristoj de Jaeno en la 5-a kaj 6-a jardeko de la pasinta jarcento interesiĝis pri nia lingvo.

Laŭ oni diris pri ŝi, okaze de omaĝo por festi sian 80-an datrevenon, ŝi estis virino sendependa, nobl-kora, luktema, konanta ĉiutagajn problemojn, avida ĵurnal-leganto kaj senlima esploristo pri kulturaj temoj.

Okaze de la fondiĝo de la Jaena Universitato, ŝi estis agnoskata kiel

universitata pioniro en Jaeno, kaj oni diris pri ŝi, ke temis pri la plej grava virino en *Alcalá la Real* dum la dua duono de la pasinta jarcento.

Carmen Juan Lovera forpasis en *Alcalá la Real* en la jaro 2018.

313 — Benet Forner, Vicente. Parroquia de Vera,
ALCALÁ LA REAL (Jaén)
1.287 — Juan Lovera, Carmen. Monjas, 7.
ALCAUDETE (Jaén)

*Registro de Carmen Juan Lovera kiel membro de
Hispana Esperanto-Federacio en la jaro 1962.*



Placeto dediĉita al Carmen Juan Lovera en Alcalá la Real (Jaeno)



$E = mc^2$ *Scienca Angulo*

Skleroto kaj Sklerozo

Etimologio, helpu nin !



Juan García del Río

Mi ege ŝatas legi librojn pri sciencoj; kaj samtempe, mi ŝategas etimologiaĵojn. Kelkfoje, okazas ke unu el tiuj lerno-objektoj helpas la alian por pli bone kompreni la tuton. Tio okazis al mi antaŭ kelkaj tagoj, kiam mi renkontis, tuthazarde, la vortojn *sklerozo* kaj *skleroto*. Helpe de PIV kaj de aliaj fontoj, ni vidu kion ili signifas:

- *Sklerozo*: malsano okazigita de malmoliĝo de organo aŭ histo pro primultiĝo kaj plidensiĝo de kolageno...

- *Skleroto*: okulblanko; membrano kiu konsistigas la ŝelon de la okulglobo...

Tuj poste, mi vidis ke PIV inkludas ankaŭ la adjektivon sklera, kaj tie legeblas la jenon:

- *Sklera*: 1(se paroli pri histo) dikiĝintaj kaj fibreca. 2 (se paroli pri ĉelo) havanta tre dikan muron tute ligneciĝintan. Pli sube, vortoj kiel multobla sklerozo, arteriosklerozo, ktp estas ankaŭ havigitaj.

Kaj mi demandis al mi la jenon: kia rilato povas ekzisti inter la blanka parto de okuloj kaj tiu grava malsano kiuj afekcias diversajn korpajn organojn?

Post iom da serĉado kaj esplorado tra diversaj vortaroj, mi alvenis al la konkludo ke ambaŭ vortoj devenas el la sama greka radiko. Kaj jen, mi eklernis ke la antikva greka adjektivo



σκληρός- ἄ- όν (elp. /skleros- a- on/) signifas “malmola”, “dura”. Kaj la solvo kuŝas tie. Ĉar skleroto estas malmola parto de la okulo, pro tio ke ĝi devas protekti ĝin fronte al eksteraj elementoj.

Kaj la malsano sklerozo originas el la malmoliĝo de histo, kutime pro manko de mjelino.

Konkludo: fakoj kiuj -unuavide kaj ŝajne- estas tre malsamaj (kiel scienco kaj etimologio) ofte komplementas sin reciproke. Feliĉe...



SCIENCO POVAS SAVI VIAN VIVON!



Flamenko

Manuel Vega García

"El Carbonerillo"

Manuel Vega García naskiĝis en Sevilo en la jaro 1906. Li patro distribuis ligno-karbon en la urbo, pro tio li estis konata kiel *"El Carbonerillo"* (la eta karbonisto). Li estis cigano kaj konis la flamenkan etoson, tiel, apenaŭ 12-jaraĝa li debutis kiel profesia flamenka kantisto en unu el la plej prestiĝaj spektaklejoj de la urbo.

Kvankam *"El Carbonerillo"* estis lerta kantisto de diversaj kant-stiloj, inter ili *seguiriyas*, tarantoj, tangoj kaj solearoj, li estis tre konata pro siaj fandangoj, li eĉ kreis propran version de ĉi tiu flamenka stilo. Oni diras, ke fandango rakontas historion per kvin versoj, tamen, la fandangoj de El Carbonerillo rakontas ne nur historion, sed ankaŭ sian doloron, suferadon kaj eĉ ploron, kaj ĉi ĉio eliras el la gorĝo de la kantisto.

El Carbonerillo surdiskigis sesdekon da kantaĵoj inter la jaroj 1927 kaj 1932, do, ankoraŭ hodiaŭ estas eble aŭskulti rekte lian voĉon. Li ludis ne nur en Andaluzio, sed ankaŭ en Madrido, en la jaro 1932, tio signifas, ke li atingis grandan famon



Manuel Vega García *"El Carbonerillo"*
1906 ~ 1937

en la flamenka mondo, ĉar malmultaj kantistoj triumfis en Madrido.

Kiel dirite, El Carbonerillo kantis tristajn historiojn, tiun bedaŭron li mem vivis en sia privata vivo, tiel, rifuzita de koramikino, li eniris en zigzagan vivon plena je alkoholo. Li forpasis en la jaro 1937.

Pri li, oni diris, ke en lia rompita gorĝo koncentriĝis furioza kolero, kiu estis por li, doloriga dorno.

Fandangoj de El Carbonerillo:

*Almazon infano petas,
sur izolita strato li vagas.
Almazon al ĉiuj li petas,
ĉar patrino ege malsanas.
La morton ŝi jam sentas.
Ĉe ŝi medicinaĵoj mankas.*

(1932)



*En mia kor' reĝino ŝi estis,
sed foriris ĵus tiu feliĉo.
En mia kor' reĝino ŝi estis.
Mi vidis, ke patrin' forirus
kaj tute solan min lasis
kiu en la mondo plie min amis.*

(1929)



En Youtube estas eble aŭdi antikvajn kantaĵojn de "El Carbonerillo" ĉe:
<https://www.youtube.com/watch?v=iY8WXatVb64>

FLAMENKA VORTARO

- **Arrancarse (Komenci):** Ekigi kantadon aŭ dancado fare de flamenka artisto.
- **Falseta (Fiorituro):** Ludado de akompananta gitaro kiam la kantisto silentas inter strofoj.
- **Jalear (Aplaŭdi):** Klakfrapi manojn kaj aklame bruadi fare de akompanantoj de flamenka kantisto.
- **Temple (Agord-kanto):** Sonoj faritaj de la flamenka kantisto por atingi ĝustan rilaton inter sia voĉo kaj la sono de la gitaro.



Fervojista Angulo

Al-Ándalus Expreso

En la jaro 1983, Hispana Fervoja Reto (RENFE) startigis luksan vagonaron, temis pri la trajno *Al-Ándalus Expreso*. La ideo ekfunkciigi ĉi tiun trajnon estis simila al tiu luksa trajno kiu unuigis Eŭropon, ekde Parizo, kun Oriento, ĝis Istambulo. La celo de *Al-Ándalus Expreso* estis viziti kaj turismi tra Andaluzio kun haltoj en la plej belaj andaluziaj urboj.

La trajno konsistis el 14 vagonoj. Du el ili estis restoracioj, unu vagono utilis kiel trinkejo, alia kiel kazino, kvin lit-vagonoj por ripozi kaj fine

plia vagono utilis kiel kuirejo. Entute sur tiu trajno povis vojaĝi 75 turistoj. Ĉiuj vagonoj estis vere luksaj, tiel, tiuj kvin lit-vagonoj estis konstruitaj en Francio en la jaro 1929 kaj ili estis uzitaj de la brita monarkio por vojaĝi de la urbo Calais en la francan mediteranean marbordon dum la someraj vojaĝoj de la britaj reĝoj.

Malsimile al tiu Orienta Ekspreso, kiu nur organizis trajnan vojaĝon, per *Al-Ándalus Expreso* estis eble viziti ĉiujn vilaĝojn kie la vagonaro haltiĝis, ĉefe Sevilo, Kordovo kaj Granado.



Tiu luksa trajno cirkulis tra Andaluzio de 1985 ĝis 2005. En ĉi tiu jaro *Iberrail*, la entrepreno kiu realigis la projekton, bankrotis. Do, tiuj luksaj vagonaroj haltiĝis en Sevilo. Tie, bedaŭrinde, la tuta materialo difektiĝis.

La vagonaro estas uzata ofte por viziti kaj turismi ne nur tra Andaluzio. Tiel, oni organizas trajnajn vojaĝojn por viziti pliajn lokojn, kiel Ekstremaduron, Kastilion kaj eĉ Galegion. La celo estas viziti vin-kelajn regionojn.



Vagono kiu utilas kiel restoracio en Ál-Ándalus Expreso

Tamen, la vagonaroj utilis, de tempo al tempo, kiel scenejoj por filmoj.

En la jaro 2012, RENFE proponis refunkciigi la ideon pri luksaj trajnoj por turismi tra Hispanio. Do, ekde la jaro 2014, 15 vagonoj cirkulas tra Andaluzio en tiu nova *Al-Ándalus Expreso*.

En Andaluzio la vojaĝo daŭras sep tagojn. Dum tiu semajno estas eble viziti Sevilon, Jerezon, Kadizon, Arundon, Granadon, Baezon, Ubedon kaj Kordovon. Ĉar temas pri luksa vojaĝo, la kosto estas tre multekosta, inter 3.800 kaj 4.800 eŭroj, kvankam, kiel dirite, ne temas pri simpla trajna vojaĝo, sed pri altkvalita vizito de tiuj andaluziaj urboj kun ekskursoj kaj ĉeestoj al la plej bonaj restoracioj de ĉiuj urboj vizititaj.



Hispana Amikaro de Fervojistoj
Esperantistaj

fervojista@esperanto.ac

Nun Ni


Infanoj

LA BAZAJ KOLOROJ

Ekzistas 3 (tri) bazaj koloroj, ĉiuj ceteraj aperas kiam ili kuniĝas.




Kiam ili kuniĝas aperas la sekundaraj koloroj. Jen ili:




Ĉu vi konas la ludon "Tiktakon"? Ĝi ankaŭ nomiĝas "Tri en Vico" aŭ "Ikso kaj O". Vi devas uzi krajonon kaj paperon por ludi. Unu el la ludantoj nomiĝas X (ikso) kaj la alia O.

La ludantoj skribas siajn literojn (ikson aŭ O) alterne sur la kvadratoj de 3 x 3 (tri per tri) krado. La ludanto, kiu skribas tri de siaj simboloj en vico, gajnas.

Ni rakontos al vi sekreton.... se vi komencas la ludon kaj vi okupas la centran kvadraton VI ĈIAM GAJNOS !!!! Kiel? Vidu:




Unue, vi devas okupi la centran kvadraton.




La dua ludanto skribos sian simbolon sur kvadrato

Nun, vi devas devigi la alian ludanton skribi lian simbolon sur tuj-apuda kvadrato. Tio estas, la du simboloj de la alia ludanto devas esti unu apud la alia. Tiel:



aŭ




Ekde ĉi tiu numero de la revuo ni redaktas paĝojn speciale pripensitaj por infanoj, ĉar ni scias, ke jam kelkaj infanoj en Andaluzio ekparolas esperanton.

Ni atendas viajn kontribuojn !


La respondo de la alia ludanto nepre devos esti:



aŭ




Nun vi devos eviti, ke li skribu rektan vicon:



aŭ




Tiam, la alia ludanto nepre devos ludi ĉi tiel:




aŭ



Kaj vi jam gajnas



aŭ





Andaluza Kuirarto

Gazpaĉo el melono

Sur la paĝo 35-a oni diras, ke unu el la tipaj manĝaĵoj de *Porcuna* estas la gazpaĉo el melono. Kvankam tradicie gazpaĉoj estas faritaj kun tomato, verdire la unuaj gazpaĉoj estis popularaj manĝaĵoj farita el pano, ajlo kaj oliv-oleo. Fruktojn aŭ legomojn, kiel melonon aŭ tomaton, oni aldonis poste. Do, ni prezentas ĉi-numere gazpaĉon farita el melono.

Ingrediencoj por 2 manĝantoj:

- Melono (400 gramoj).
- Ajlero (tre malgranda).
- Ŝenoprazo (50 gramoj).
- Itala verda kapsiko.
- Kukumo.
- Pano (10 gramoj).
- Oliv-oleo (kulerego)
- Salo.
- Blanka papriko (malmulte).



Melono

Ŝenoprazo



Kukumo



Elektra
Kirlilo



Kaj jen la preparado:

- 1) Sen-ŝeligu la ajleron. Ĉi tiu gazpaĉo estas iom dolĉa, do, ne aldonu grandan ajleron. Sen-ŝeligu ankaŭ la ŝenoprazon kaj distranĉu en pecojn.
- 2) Lavu la kapsikon kaj distranĉu ĝin en grandajn pecojn. Sen-ŝeligu la kukumon kaj forigu la grajnoj. Distranĉu la melonon en grandajn pecojn. Ankaŭ forigu la grajnoj.
- 3) Enmetu ĉiujn ingrediencojn en elektran kirlilon. Dum la kirlado aldonu oliv-oleon, salon kaj blankan paprikon. Vi devas kirli ĉion dum 2 minutoj.
- 4) Temas pri malvarma manĝaĵon, do, enmetu la kirlaĵon en fridujon.



Misteroj kaj Legendoj de Andaluzio

La tarŝisaj reĝoj Gargoro kaj Habo

Tarŝiŝo estis antikva civilizacio, pri kiu oni trovis malmultajn arkeologiajn restaĵojn. Oni diras, ke ties urboj troviĝis en la nuntempa okcidenta Andaluzio kaj en Ekstremaduro, ĉefe en la provincoj Onubo kaj Sevilo.

Du el la plej konataj tarŝisaj reĝoj estis Gargoro (*latine: Gargaris*) kaj Habo (*latine: Habis aŭ Habidis*). La romia historiisto Knaeus Pompejus Trogus, en sia verko *Historiae* (Historioj) de la 1-a jarcento a.K., skribis jenon pri la originoj de la mita reĝo Habo:

Ĉe la arbaroj de Tarŝiŝo, ĝuste tie kie laŭdire Titanoj luktis kontra la dioj, loĝas la kuneta popolo, unue el kiuj antikvaj reĝoj estis Gargoro, la unua kiu konis la utilon rikolti mielon.

Ĉi tiu reĝo perfortis sian propran filinon, el kiu naskiĝis infano. La reĝo, pro la honto, volis pereigi la ĵus-naskitan filon. Tiel, li ordonis lasi lin sen-nutre en la arbaron. Sed, post kelkaj tagoj, la servistoj de la reĝo trovis lin viva kaj nutrigita de la lakto de bestoj de la arbaro. Tiam, la reĝo ordonis lasi lin meze de vojo, kun la espero, ke li mortu piedpremita de la



multnombra brutaro trapasanta. Tamen, anstataŭ tio, ĉiuj bestoj nutris lin. Same okazis kiam la reĝo ordonis ĵeti la infanon al malsataj hundoj, male, hundinoj nutris lin per sia lakto.

Ĉar en la tero, la infano estis prizorgita de bestoj, la reĝo ordonis dronigi lin en la oceanon. Sed, la dioj volis, ke meze de la mar-ondo aperu ŝipo, kiu savis la infanon kaj transportis lin en proksiman plaĝon. Tie, cervino nutris lin.

La infano kreskis kaj fariĝis bandito. Arestita en la arbaro de grupo de homoj, ili prezentis la malliberigiton antaŭ la reĝo Gargoro,

kiu tuj rekonis lin. La reĝo, pentita, ordonis trakti lin kiel princon, ĉar li estis sia filo kaj sia nepo samtempe. Li ricevis la nomon Habo. Post kelke da tempo, li sukcedis la reĝon.

Ĉar li tre bone konis bestojn, li instruis al popolo uzi bovojn por kulturi agron. Tiel, ili ekuzis tritikon kiel nutraĵon. Ekde tiam, la popolo ĉesis manĝi sovaĝajn fruktojn de la arbaro kaj nutris sin per kulturitaj produktoj.

Habo malpermesis trakti homojn kiel sklavojn kaj li fondis sep urbojn en sia regno. Li havis multnombrian idaron kiu prizorgis la regnon dum jarcentoj.



Vorto-Ludoj



Krucvorto

	1	2	3	4	5	6	7
A							
B							
C		■			■		
Ĉ		■					
D					■		
E						■	
F							

HORIZONTALALE

- A. Transigi iun tekston aŭ konversacion de unu lingvo en alian,
- B. (*Inverse*) Grupo de plurjaraj herboj kun ovoforma bulbo, el kiu kreskas du folioj kaj unu pedunklo, kiu portas blankan, pendan floron
- C. Konsonanto. ■ Du konsonantoj. ■ (*Inverse kaj sen la lasta vokalo*) Patro de patro.
- Ĉ. En la hispanaj aŭtomobiloj. ■ (*Inverse*) Kalkulilo, konsistanta el bidoj trairitaj de stangoj, laŭ kiuj ili estas ŝoveblaj.
- D. (*Inverse kaj akuzative*) Elementa peceto. ■ (*Inverse*) Sufikso almetiganta al numeraloj kaj uzata por derivi vortojn, indikantajn unu el la egalaj partoj de tuto.
- E. Grupo de ludantoj de unu flanko ■ Vokalo.
- F. (Plurale) Aluda nomo, kiun homo povas ricevi de siaj kunvivantoj.

VERTIKALE

1. Rilata al monta rivero, kun rapidega fluo kaj granda erozia povo.
2. (*Inverse*) Trovebla en la turkaj aŭtomobiloj. ■ (*Inverse*) Flanko de ŝipo, kiu estas ŝirmita kontraŭ la vento.
3. (*Sen la lasta vokalo*) ano de eŭropa ŝtato.
4. Inklino al atestado per vortoj, ke oni ricevis de iu bonon kaj ŝatis tiun favoron.
5. Sufikso signifanta individuon, personon. ■ Sur la aŭstriaĵaj aŭtomobiloj. ■ En medicino, sufikso indikanta benignan aŭ malignan tumoron el difinita histo.
6. Kuboforma konstruaĵo, meze de la granda moskeo de Mekko, entenanta la Nigran Ŝtonon. ■ Vokalo.
7. (*Plurale*) grupo de grandaj amerikaj reptilioj el la subordo de lacertuloj.

Rebuso



En kiu loko situis la soldatoj? _____

*Se vi kapablis solvi ĉi tiujn vorto-ludojn, sendu vian solvon al jena ret-adreso:
cordoba@esperanto.ac*

SOLVOJ AL LA PASINTAJ KRUCVORTO KAJ REBUSO

	1	2	3	4	5	6	7
A	K	O	J	O	N	O	J
B	A	M	O		O	R	A
C	N	O	D	E	T	O	N
Ĉ	K	R	A	J	O	N	O
D	R		R	O	Z		I
E	O	L	I		I	U	R
F	J	O	G	U	R	T	O

REBUSO

Kie vi estis dum la ferio-tago? *En la kamparo.*

Sur la bildo aperas PARO da kokidoj ene de KAMO (Kam').

Do, "En la kam' paro" = "En la kamparo"

HUMURO



Andaluzia Esperanto-Unuiĝo

Asociación Andaluza de Esperanto



Andaluzia Esperanto-Unuiĝo estas la asocio kiu strebas al la disvastigo de la internacia lingvo Esperanto en Andaluzio. Ĝi fondiĝis en la jaro 1984a danke al la iniciato de geesperantistoj de la provincoj Malago, Sevilo kaj Kordovo. Hodiaŭ apartenas kaj kunlaboras kun A.E.U. geesperantistoj de la tuta Andaluzio kaj eĉ ekster ĝi

La Asociación Andaluza de Esperanto es la organización que tiene como objetivo difundir la lengua internacional esperanto en Andalucía. Se fundó en el año 1984 gracias a la iniciativa de esperantistas de las provincias de Málaga, Sevilla y Córdoba. Hoy pertenecen y colaboran con AEU esperantistas de toda Andalucía y también de fuera de ella.

Estraro

Prezidanto / Presidente:
Vicepresidente / Viceprezidanto:
Sekretario / Secretario:
Kasisto / Cajero:
Voĉdonantoj / Vocales:

Directiva

Ángel Arquillos López
Fátima Jiménez García
José M^a Rodríguez Hernández
M^a Dolores Torres Mateo
Jordi Lietor López
Juan García del Río
Carlos Spinola
Alejandro Burgos Escalante
Juan Díaz Casado

Poŝta adreso / Dirección Postal: C/ Ánfora 6 5º D 29013 Málaga (Hispanio)

TTT-paĝo / Página web: www.esperanto.ac

Tvitero / Twitter: [@AndaluzioEO](https://twitter.com/AndaluzioEO)

[Aliaj adresoj de la E-movado / Otras direcciones del movimiento esperantista:](#)

Federación Española de Esperanto: www.esperanto.es

Asociación Universal de Esperanto: www.uea.org





ESPERANTO

LA LENGUA INTERNACIONAL JUSTA
PARA EL DIÁLOGO Y LA PAZ

DÍA DE ZAMENHOF

15/12/2021

Aniversario de Ludoviko Zamenhof,
iniciador de la lengua internacional
Esperanto

